kun italaj lernantoj de Esperanto, bone profitis la okazon por kunvivi en malgranda Esperantujo. Se iu instruisto de Esperanto interesiĝas pri la temo, volu lin kontakti.

Pedro Hernández, nia Prezidanto, bone kaj detale informis pri instruo de Esperanto al la idoj, kiun li nomis **Denaskiĝo.** Li instruas Esperanton al siaj du filoj, kvankam unu el ili estas ankoraŭ bebo, la alia sesjara jam bonege parolas Esperanton.

Revenis nia samideano Aduriz kun sia serio Sferoj, multaj detaloj, kiel li pretigis tiun librojn, kiuj bone sukcesas en la Esperanta merkato.

Ne povis manki nia laborema Rafaela Urueña, kiu per la temo **Kial baloti al la Eŭropa Parlamento,** Rememorigis la longan vojon trairitan ĝis nun. Laŭ ŝi, estas necesa la Eŭropa Unuiĝo se ni deziras, ke nia kontinento, estonte, daŭre estu potenco.

**La Ĝenerala Kunsido de HEF.** La nunjara kongreso estis tre simila al aliaj kongresoj, en kiuj oni instigas al plia laboro, precipe "akiri" pliajn membrojn. Tiucele la Prezidanto prezentis siajn vidpunktojn. Unu el tiuj opinioj estas, kvazaŭ dividi la landon en regionojn por aktivigi kontaktojn. De ekonomia vidpunkto verŝajne HEF troviĝas en kontentiga situacio kaj por 2010 ne estos plialtigo de la kotizoj.

Ankaŭ oni prezentis la eblecon de UEA–kongreso en 2010, kiu naskiĝis de privata entrepreno, sed nun en manoj de HEF. En septembro vizitos Madridon Osmo Buller.

Pro rezigno de la Prezidanto (elektita pasintjare) estis elektita **Prezidanto,** Pedro Hérnandez Ubeda, ĝis nun vicprezidanto de HEF.

**Luis Serrano Pérez**






# SOLIDARECO

## Prelego de Luis Serrano en la 68a Hispana Kongreso de Esperanto

Unu el la vortoj plej parolataj en la mondo, estas la vorto **Solidareco.** Tiu vorto estas en la menso de ĉiu homo, ĝi akompanas nin konstante. Surstrate oni vidas multajn anoncojn, kiuj atentigas nin pri tiu vorto. Konstante oni marteladas nin pri tiu socia temo. Ĉu tiel grava estas la solidareco? Permesu al mi ke, unue, mi klarigu al vi, kion estas solidareco laŭ **Plena Ilustrita Vortaro**. **Solidara. 1. prenanta sur sin la respondecon pri la agoj de aliaj personoj: -esti solidara kun la samideanoj; senti sin solidara kun la tuta pensanta mondo. 2. Akceptinda respondeco pri la ŝuldoj de aliaj personoj: la edzo estas ŝulda kun sia edzino (analoge) niaj interesoj estas solidaraj. Solidareco. Reciprokra dependenco, komunumeco de interesoj, sentoj kaj agoj. Liberigi la esperantistojn de ĉia suspektebla solidareco kun miaj privataj politikaj kaj religiaj konvinkoj (opinio de Zamenhof), striko de solidareco. Interdependa respondeco pri ŝuldoj, mondevoj kaj tiel plu. La solidareco de la heredintoj.**

En tiuj difinoj pri solidareco en la **Plena Ilustrita Vortaro**, estas esprimoj aŭ pensoj, kiuj jam estas for de nia moderna kunvivado. Ekzemple: **la edzo estas ŝulda kun sia edzino,** estas evidente, ke laŭ moderna vivmaniero aŭ laŭleĝe la edzo ne bezonas esti ŝulda kun sia edzino, ĉar la nunaj leĝoj, almenaŭ surpapere ni estas komplete egalaj kaj kun la samaj devoj kaj rajtoj. Mi nenian aŭdas diri, tiu sinjoro ne estas ŝulda